10-a Oktobro: tago kiu malfermis la vojon al kuba sendependeco

De M. Gutiérrez

La 10-an de oktobro, estas konata kiel la naciliberiga tago, ?ar tiam la juna advokato Carlos Manuel de Céspedes deklaris la komencon de la sendependigaj bataloj.

Tiu ?i estas konata kiel la unua milito kontra? la hispanaj koloniistoj, kvankam ?i ne estis la sola. Tamen ?i anta?epu?is la naciliberigan senton de la naski?inta kubaneco.
Elvokante ?in, oni nepre devas paroli pri brilaj homoj.

La batalkrio okazinta la 10-an de oktobro en la sukerfabriko La Demajagua, oriente de nia insulo, estis iniciatita de Carlos Manuel de Céspedes, advokato de la orienta urbo Bayamo.

Li legis manifeston celantan postuli la sendependi?on de Kubo kaj gvidis armitan movadon kiu poste da?ris dek jarojn je konstanta batalo favore al la liberiga idearo de la kubanoj.

Sed li ne estis sola. Akompanis lin pluraj kunlaborantoj, grandparte, viroj je alta instrunivelo, same kiel la ceteraj ribelintoj tra la tuta lando. Inter tiuj estis Pedro Figueredo kaj Francisco Maceo, amba? advokatoj.

Anka? en la najbara urbo Camaguey, apuda provinco de la orienta regiono, aliaj elstaraj viroj iris al batalo, interalie Ignacio Agramonte, advokato, eminenta studento de la universitatoj de Barcelono kaj Havano. Anka? Eduardo Agramonte, diplomito pri medicino en la barcelona universitato.

Multaj aliaj same faris en aliaj provincoj, inter ili, la? historiistoj raportas, estis pli ol 200 personoj el diversaj profesioj, advokatoj, medicinistoj, dentistoj, farmaciisto, profesoroj, verkistoj, poetoj kaj studentoj, supozeble universitatanoj, gimnaziano kaj skribistoj.

Pro tio, kiel prave diris la historiisto Portuondo, ne estis strange ke iom anta? la ribeli?o la 10an de oktobro en Bayamo, la hispana kapitano generalo Francisco Lersundi, jam rimarkis ke tra la tuta insulo floris, dum la unuaj jaroj de la 60-a jardeko, ?urnaloj kiuj senrezerve diskonigis siajn sendependigajn doktrinojn, kiujn Lersundi taksis “fajrigaj”.

Jen kelkaj elstaruloj de la kuba historio dum la sendependigaj bataloj okazintaj en la deknaúa jarcento, kiuj estas memorataj ?iujare la 10-an de oktobro, nacia festotago, ?ar ?i malfermis la vojon al sendependi?o, kaj estas paradigmo de pluraj generacioj de kubanoj ?is hodia?.

---

https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/367166-10-a-oktobro-tago-kiu-malfermis-la-vojon-al-kuba-sendependeco

Radio Habana Cuba